

The Meatrix
Esperanto Script
Reformatted May 2007

*La ekrano diras "Kio estas la Meatrico?" (Notu, ke en la angla, "Meat" signifas "viando".n.)
Ni vidas tipan familian farmbienon, kelkajn porkojn, kokojn, kaj bovojn. Farmisto venas kaj verŝas
manĝaĵon en la ujon.*

FARMISTO

Jen, Leo.

Leo, la porko, blekas feliĉe. Kaj ekmanĝas.

MOOPHEUS

Psst, Leo!

*Leo rigardas ombrecan bovon kun okulŝirmiloj kaj longa jako, kiu staras apud la
farmdomo.*

LEO

Kiu estas vi? Kiel vi scias mian nomon?

MOOPHEUS

Mi estas Moopheus, kaj mi scias multon pri vi. Ĉu vi konas la Meatricon?

LEO

La Meatricon?

MOOPHEUS

Ĉu vi volas scii, kio ĝi estas?

LEO

Bone.

MOOPHEUS

La Meatrico estas ĉie ĉirkaŭ vi, Leo. Ĝi estas la rakonto, kiun ni rakontas al ni mem, pri la deveno de viando kaj bestoproduktaĵoj. Ĉi tiu familia farmbieno estas fantasio, Leo. Manĝu la bluan pilolon kaj restu ĉi tie en la fantasio, manĝu la ruĝan pilolon kaj mi montros al vi la veron.

*Leo manĝas la ruĝan pilolon. Ili spertas frenezan ŝanĝon. Kaj fine troviĝas en grandega
malagrabla porkejo de fabrikeja farmbieno, kun porkoj en gravedecaj staloj en ĉiuj
direktoj. Leo trovas sin en unu el ili.*

MOOPHEUS

Bonvenon al la reala mondo.

LEO

Ho! Kio estas ĉi tiu terura loko?

MOOPHEUS

Tio ĉi estas fabrikeja farmbieno, Leo. La plimulto da ovoj, lakto, kaj viando devenas de lokoj kiel tio ĉi.

LEO

Kiel ĉi tio okazis?

MOOPHEUS

Mi montru al vi.

(MOOPHEUS alportas Leon al familia farmbieno. Ili staras kiel ombroj en la antaŭo.)

En la mezo de la 20a jarcento, avidaj agraj firmaoj komencis ŝanĝi familiajn farmbienojn por maksimumigi sian profiton malgraŭ egan malprofiton kaj al homoj kaj al bestoj. Fabrikejaj farmbienoj naskiĝis.

Timigaj maŝin-robotoj venas de la horizonto. La ĉielo mallumiĝas. De la vidpunkto de ruĝa komputila ekrano, ni rigardas la familian farmbienon fariĝi fabrikejan farmbienon. Temvortoj aperas ĉe la malsupro de la ekrano. La unua estas "krueleco al bestoj".

Oni pakas bestojn kiel eble plej dense. La plejmulto neniam vidas sunlumon, tuŝas teron, aŭ spiras freŝan aeron. Multaj eĉ ne povas turni sin.

Ĉi tia kruela situacio kaŭzas bataloj kaj malsanoj inter la bestoj. Por plibonigi tion, la firmaoj komencis sisteman mutiladon, ekzemple la senbekigadon de kokoj, kaj komencis aldoni konstantan kvanton de antibiotikoj al la manĝaĵo, por ke ĉi tiuj kompatindaj mizeruloj nur restu vivaj. Ĉi tiu trouzo de antibiotikoj bredas tipojn de rezistemaj malsanigaj ĝermoj. Ĉiun tagon ni alproksimiĝas al malsaneco kiun oni ne povos haltigi.

("antibiotik-rezistemaj ĝermoj" aperas ĉe la malsupro de la ekrano.)

LEO

Hu! Kiu estas tiuodoro?

MOOPHEUS*(muffled)*

5 milionoj da kilgramoj de ekskremento!

Tio ĉi malpurigas la aeron kaj grundakvon. Tial komunumoj proksimaj al fabrikejaj farmbienoj ofte suferas altajn nivelojn de rilataj malsanoj.

("ega poluado" aperas ĉe la malsupro de la ekrano.)

LEO

Nu, odoras kiel ffff...

MOOPHEUS

Kaj tiuj firmaoj jam detruas komunumojn kaj mistraktas siajn laboristojn dum jardekoj. De 1950 ĝis nun, pli ol 2 milionoj da malgrandaj porkbienoj malaperis. Se tio daŭras je tiu ĉi rapido, ne plu restos iuj ajn veraj sendependaj familiaj farmbienoj.

(Ni vidas pejzaĝon kun robotoj kiuj detruas ruĝajn farmdomoj kaj starigas grizajn fabrikejajn farmbienojn; la ĉielo pli kaj pli mallumiĝas.) ("detruitaj komunumoj" aperas ĉe la malsupro de la ekrano.)

Tio estas la Meatriko, Leo. La mensogo kiun ni diras al ni mem pri la deveno de nia manĝaĵo.

MOOPHEUS

Sed ne estas tro malfrue, ekzistas rezisto.

(Venas alia porko kaj koko. Ĉiuj portas nigrajn jakojn kaj okulŝirmiloj.)

LEO

Mi aliĝu

(Kolera, Leo saltas el la stalfako kaj haltas en "kuglo-tempo" kiel en La Matrico.)

Kiel ni haltigos ilin Moopheus?

MOOPHEUS(Al la rigardanto)

Ni disvastigos la informon. Sed estas vi, la konsumanto, kiu havas la veran potencon! Ne subtenu fabrikejajn farmbienoĵojn! Ekzistas arego de alternativoj!

(Moopheus eltenas sian hufon kun granda ruĝa pilolo en ĝi.)

Klaku ĉi tie kaj mi montros al vi tion, kion vi povas fari por eskapi de la Meatrico.